# BEJO

## TRIDEKJARIĜO

Konsiderante la gravan fakton, ke la Esperanto-Movado bezonas senĉese konstantan akceladon, kaj konsiderante, ke la junularaj Esperantistaj grupoj estas unu el la ĉefaj rimedoj por efektivigi tiun akceladon, kaj agnoskante, ke la esto de tut-Brazila junul-organizaĵo konsistigas neflankenlaseblan elementon por homogena agado en Brazilo, ni, junuloj, sub-skribintaj tiun ĉi deklaron, plene aprobas la fondon de tia organizaĵo nomota B.E.J.O. (Brazila Esperantista Junulara Organizo)

# Enkonduko

Jen la invito promeni tra la historio de BEJO. Ni klopodis meti tie ĉi la plej interesajn kaj kuriozajn informojn registritajn de la tiamaj junaj esperantistoj. La historio de BEJO estas vera respegulo de la junulara brazila historio, pruvante ke en BEJO estas tiom da "Brazila Junularo" kiom da "Esperantista Organizo". Tie ĉi oni konscios pri la sinteno de la spektantoj de la famaj "festivaloj de populara muziko" de kie estis lanĉitaj nomoj kiel Chico Burque de Holanda, Milton Nascimento, Gutemberg Guarabira. Gutemberg Guarabira?!?! Jes. Legu kaj sciu la antaŭvidon fare de la raportisto por la estonto de ĉiu el ili. Ĉu iam vi aŭdis pri "Brazila Nova Kino"? Ĉu Gláuber Rocha?

Same kiel la artaj kaj movadaj novaĵoj, ankaŭ la politika portreto de Brazilo estis priskribita. La portreto de iu Brazilo konata de la nuntempaj BEJOanoj nur per folietonoj kaj televid-serioj. Pri la kvanto da informoj, ni klopodis arigi ilin el ĉiuj periodoj. Al tiuj, kiuj kontribuis, ni dankas kaj omaĝas. Bone, nur restas malfermi la pordon de tiu ĉi tempo-ĉambro, inviti vin eniri kaj deziri al vi la plej agrablan sperton!

La kompilintoj
BEJO - Estraro

# Enhavo


| | |
|---|---|
| Enkonduko | 2 |
| Salutmesaĝoj | 3 |
| La Deklaro de Santos Dumont | 4 |
| Bilda Memor-Libro | 5 |
| Intervjuoj | 6 |
| Interesaj Tekstoj | 13 |
| Dua Festivalo pri Populara Muziko | 15 |
| La Brazila Nova Kino | 17 |
| Amuzaĵoj | ĉie |


MEMORE al forpasintaj André Luís Fausto de Sousa,
BEJO-aktivulo, kaj lia patro Álvaro, subtenanto.